

# La Espero

SVENSKA ESPERANTOTIDNINGEN


Nro 7/1985 ★ Kr 8,50

Libroj — gazetoj — kursoj  
ĉio por viglaj esperantaj aktivecoj

dum

la baldaŭa

vintro



## Esperantoförbundet

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm,  
Telefon: 08-11 74 34.

EsperantoCentro är öppet  
måndag-torsdag kl. 17-19.  
Postgiro: 20 12-3, Esperanto-  
förbundet.

### Medlemsavgift:

Direktansluten medlem 75 kr  
ungdomsmedlem t.o.m. 20 år 35 kr,  
familjemedlem (utan tidning) 25 kr.  
Prenumerationsavgift för *La Espero*  
ingår i medlemsavgiften.

Medlemmar under 30 år är samtidigt  
medlemmar i Sveriges Esperantisters  
Ungdomsförbund och får dess tidning  
Kvinpinto. Om du inte får den, med-  
dela födelseår till Esperanto Centro.

## SEF:s styrelse

**Ordförande:** Karin Lindquist  
tel. 0589-155 31

**Sekreterare:** Anita Lindblom  
tel. 08-773 40 24

**Kassör:** Börje Andersson  
tel. 0500-122 05

Märtha Andreasson, Åke Rohdin,  
Kersin Rohdin, Birger Viggén

### Suppleanter:

Ingemar Nordin, Bertil Andreasson

## La Espero

Organ för Svenska  
Esperantoförbundet.

Adress: EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm.  
Ansvarig utgivare: Bertil Åkerberg.

### Redaktion:

Karin Lindquist (huvudansvarig)  
Västermovägen 19, 732 00 Arboga  
tel. 0589 - 155 31

Ulf Ribers, Norra Freberga,  
591 90 Motala, tel. 0141-220 35.

Bertil Danielsson (layout)

Årjäng, tel. 0573-105 69.

### Fotosats och tryck:

EsperantoCentro, Stockholm 1985

Manuskript sändes en månad före  
utgivningsdatum till  
Karin Lindquist (adress se ovan).

## Esperantoförlaget

### Postadress:

Box 7502, 200 42 Malmö.

### Besöksadress:

Möllevångsgatan 20 B.

Öppettider: 1 sept.-15 maj:

onsdagar 10-11, torsdagar 17-18.

Skriftliga beställningar expedieras  
hela året, även under sommaren.

Telefon: 040-12 20 29.

Postgiro: 578-5.

Expedition: Wivi Nilsson.

Styrelsens ordförande:

Anita Lindblom.

# HODIAŬ

## Nu är de färdiga!

Dekaler runda 10 cm i diameter

kr 2:–

Dekaler långa 60x8 cm

kr 3:50

Brevmärken, samma utseende som runda dekalen.

1 karta = 35 märken

kr 11:–

Se prov här bredvid – det svarta är grönt!

Beställ hos EsperantoCentro,  
Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm  
Tel. 08-11 74 34

eller genom din klubb

(sändkostnader tillkommer)

**MEN BESTÄLL GENAST!**

Sänd inte i väg ett brev utan "märket". Sätt dekalerna överallt –  
på bilar, på väskor, på era ytterdörrar... Visa upp att esperanto  
finns.



## INNEHÅLL/ENHAVO

- 84 Nomkolektado....  
Marknadsföringskurs  
Kia estis la Kongreso?
- 85 Parte nova estraro en ILEI
- 87 La virinaj konferencoj en Nairobi
- 88 Nova internacia organizo....  
Libe ankaŭ kongresis en Augsburg
- 89 Bokauktion 3  
Dags att prenumerera!
- 90 Bokrecensioner  
Simpozio pri Esperanto....
- 91 Dankon  
Dags för UEA 1986  
Aland konkeris la korojn....
- 92 Portretoj de honoraj membroj
- 93 Tra la lando
- 95 Opinio
- 96 Så här kan du göra  
Kurso en "knappologi"!  
Esperanto på andra plats

## Prezidanto:

### Seminario pri informado

Universala esperanto-kongreso ja estas la plej grava okazintaĵo en la esperanto-mondo dum la jaro. La multaj decidoj kaj proponoj tie, koncernas kompreneble la laboron de la landaj asocioj. Kaj pro tiu ni ankaŭ en ĉi tiu numero raportas pri la kongreso diversloke en la gazeto.

Märtha Andreasson kaj mi partoprenis seminarion pri informado, kiu okazis du tagoj antaŭ la kongreso. Partoprenis 36 personoj el 20 landoj. Estis tre vigla diskuto pri la plej efika metodo diversmaniere informi.

La partoprenantoj dum efektiva gvidado de la vicprezidanto de UEA Umeda Yosimj kaj la novelektita vicprezidanto de ILEI Edward Symoens venis al kelkaj konkludoj kaj mi citas kelkajn:

- Por nia interna, reciproka informado, ni bezonas "forumon", ĉu en la oficiala organo Esperanto, ĉu en aparta informilo.

- Niaj aktivuloj kaj respondeculoj, kiuj plej ofte estas neprofesiaj bonvolemuloj, urĝe bezonas konsilojn por plibonigi la komunan laboron. Tial estas proponita verkado de malgrandaj, facile utiligeblaj kaj praktikaj manlibroj kaj konsilaroj pri ĉiuspecaj temoj, kiel ekz. la aperinta Kiel rilati kun la gazetaro? de G Pirlet, kiel organizi ekspozicion, kiel organizi prelogon kaj kiel prelegi, kiel skribi artikolon, kiel organizi kongreson ktp.

- Ĝusta kaj adekvata argumentado estas bazo de efika informado. Disaj artikoloj kaj broŝuroj jam ekzistas sur tiu kampo. Nece-



sas kolekti ĉiujn disponeblajn argumentojn kaj kontraŭargumentojn rilate al Esperanto, trovi respondojn kaj verki strukturitan manlibron, en kiu la argumentoj estu sub rubrikaj, kun konsiloj rilate al la argumentado.

- Estas grave, ke la informantoj konsciu pri kelkaj elementaj psikologiaj leĝoj. Tiurilate Claude Piron faris pioniran laboron. Necesas aldoni la rezultojn de tiu laboro.

- Multaj bonintencaj planoj fiaskas pro manko de adekvata kaj adaptita strategio kaj malobservo de taktikaj donitaĵoj. Ni nepre petu konsilojn de specialisto pri modernaj metodoj, kiel ekz. enmerkatingo. Ni bezonas manlibron ankaŭ pri tiu temo.

- Estas nepre necese trejni, praktike formi kaj informi la agemulojn sur ĉiuj niveloj de nia movado. Flandra Esperanto-Ligo, pro sia jam akirita sperto, estas petata pretigi en kunlaboro kun aliaj asocioj gvidlibron por gvidantoj de la Esperanto-movado kaj konsilaron pri trafaj informlaboroj.

Karin Lindquist

## Nomkolektado por Esperanto La Esperantoprogresigo — Esperanto- främjandet

Laŭ la intenco la Esperantoprogresigo estu vera nomkolektada kampanjo por la ideo pri internacia lingvo. La diferenco de ordinara nomkampanjo tamen estas duobla. Unue temas pri permanenta demonstrado de popola opinio, kiun aŭtoritatoj kaj instancoj ne povos malprobi kiel nuran efemerajon, due ni havos kontakton kun granda grupo de simpatuloj kies konscion pri Esperanto ni subtenos per konstanta informado.

En la proksima estonteco la aktivaj esperantistoj restos malmultaj, (se ni ne vere streĉos nian forton) sed antaŭ la aŭtoritatoj ni devas indiki al la simpatio de la "amasoj". La ĉimomenta nombro EP-anoj estas 100!!!! Ĉu tio estas rezulto de duonjara fidela laboro de nia diligenta kolegaro de 1300 aktivaj esperantistoj??? Ne, mi supozas ke la vera kaŭzo estas ke ni ne sukcesis sufiĉe klare eksplicki la ideon.

Granda nombro de simpatuloj estas unu el la plej gravaj celoj por la jubilea jaro.

Birger Viggen

## Marknadsföringskurs

16 november i Västerås

23 november i Halmstad

Det blir en grundläggande kurs i marknadsföring som SEF ordnar på ovanstående orter. Kursen kommer också att behandla vårt eget marknadsföringspaket och dess användning och avslutas med förslag till åtgärder på hemmaplan.

Kursen vänder sig i huvudsak till de ansvariga för marknadsföring och till styrelseledamöterna i klubbarna. Men även andra som är intresserade och villiga att göra en insats är välkomna.

Kursen startar kl 10 och avslutas omkring kl 17.

Kurskostnad kronor 100. Beloppet kan betalas vid kursstart.

Kursledare Bernt Lindquist.

Är du intresserad tag kontakt med klubbstyrelsen som fått anmälningsblanketter.

Anmälan till Västerås sändes till Kerstin Rohdin, Örnköldsgatan 3, 703 50 Örebro och till Halmstad Märtha Andreasson, Lilla Tolsered, Pl 2265, 425 90 Hisings Kärra före den 10 november.

Eftersom det är så viktigt att vi får riktig fart på informationen nu bör åtminstone ett par tre personer från varje klubb komma till kursen!

Kanske din moster vill  
stödja esperanto?

## Kia Estis la Kongreso?

Kia estis la esperantokongreso en Augsburgo? Vi certe ricevus tute diversajn respondojn se vi demandus diversajn personojn. Mi mem malsimilas al la "mezulo", pro mia engaĝiteco en la organiza laboro. Sveda Esperanto-Federacio havas 2 reprezentantojn en la "Parlamento" de Universala Esperanto-Asocio — Märtha Andreasson kaj mi. La senglora nomo de tiu parlamento estas La Komitato, kaj povas esti ke tiu nomo fortimigas la kongresanojn ĉar malgraŭ la rajto aŭskulti la debatojn, tre malmultaj utiligas tiun rajton.

Alia malsimileco miakaze estas mia apartenado al la estraro de UEA. Tio signifas okupitecon kaj respondecon kaj iomete, informitecon. Oni devas afable aŭskulti plendojn kaj riproĉojn sed ankaŭ laŭdojn. Plendoj kaj laŭdoj kelkfoje servas kiel bonaj konsiloj por la planado por estontaj kongresoj. En Augsburgo ni eĉ invitas partoprenantojn al ia plend- kaj laŭdokunsido.

Mia estrara kolego Humphrey Tonkin proponis anoncon en la dumkongresa gazeto por alvoki kongresanojn kiuj vizitas sian unuan kongreson.

Venis deko da "unuafojuloj" al nia enketado kaj ni ricevis tre bonajn konsilojn. Por komenci per la lasta demando, kiu estis jene: Ĉu vi post tiu ĉi kongreso ŝatus viziti iun estontan?, ni ricevus respondon preskaŭ koruse — jes volonte — mi esperas kuraĝigi vin kiuj ankoraŭ ne travivis vian "unuan".

Montriĝis ke ili ĉiuj trarigardis libroservon kaj aĉetis multe. Tamen venis kritiko pri libroservo. Ili petis pri pli da spaco kaj pri pli bona superregarda ebleco. Ĉiuj trovis la kongresan informgazeton bona kaj utila. La kongresa libro

donis sufiĉe da praktikaj informoj sed mankas sufiĉaj informoj pri multaj el la abundaj programeroj.

La plej multaj komprenis kaj utiligis Rendevua Tabulo-n. La plej ĝena rimarkigo temas pri la problemo de la Interkonatiĝa vespero. Novuloj sentas sin ekster la afero pro manko de konatoj. Ili bezonas ekstran atenton kaj prizorgon en la unua vespero de la kongreso – solvinda kaj solvenda afero.

– Kontaktoj kun la ekstera mondo.

Estis tre bonaj kontaktoj kun la urbestro kaj aliaj instancoj en Augsburg. Oni aranĝis akcepton en la urba domo por ĉ. 200 kongresanoj. En la urbo okazis specialaj aranĝoj pro la 2000-jara jubileo de la urbo kaj pro ia revenanta pacofesto. La estraro de UEA estis invitita al du specialaj urbaj aranĝoj. En la unua estis prelego de la eksa Ĝen. sekretario de Unuiĝintaj Nacioj Kurt Waldheim, kun kiu nia UEA-prezidanto Gregoire Maertens ricevis eblecon iom paroli.

El UNESKO venis longa persona telegramo de la Ĝen. Direktoro A.M. M'Bow kaj ĝi montras lian daŭran intereson por esperanto.

– Kreskanta membraro.

UEA bezonas multe pli da individuaj membroj sed troviĝas obstakloj. Ĉar la plej evidenta obstaklo en multaj landoj estas la kotiznivelo, la Komitato de UEA decidis prove enkonduki novan kategorion ekde 1986. Tia membro ricevos informan kajeron pri UEA kaj unu numero de Esperanto Revuo en unu jaro. Oni esperas allogi familianojn kaj pli da junaj esperantistoj.

– Faka apartenado.

Okazis longaj diskutoj en Komisiono por Scienca kaj faka agado pri la graveco de faka apartenado. Ni esperas ke ĉiu membro en la esperantomovado volas serĉi sian fakon kaj apogu ĝin almenaŭ per membreco.

– Kie okazos la estontaj kongresoj de UEA?

Nu, mi kredas ke ĉiuj jam nun scias pri Pekino venontjare kaj ke

**Bertil Andreasson:**

## Parte nova estraro en ILEI

**La Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) okazigis sian 19-an Internacian Konferencon la 22-an – 29-an de julio en la Nordia popolaltlernejo, Kungälv. Partoprenis instruistoj kaj aliaj interesuloj el 8 diversaj landoj.**

**English yes – Esperanto jes**

La temo de la konferenco estis: **English yes – Esperanto jes.** Lingvoj kiel partneroj. Dum la inaŭguro la prezidanto Rektoro Helmut Sonnabend, FR Germanujo prelegis pri la temo. Li i.a. diris ke la angla lingvo estas parolata de 360 milj. da homoj. Esperanto ne estas gepatra lingvo sed funkcias kiel la dua lingvo por 12 milj. Ni substrekas la egalecon de ĉiuj lingvoj sed mondaj instancoj kiel UNESKO kaj landaj registaroj preferas la t.n. grandlingvojn. Temas pri la angla, franca aŭ la rusa lingvoj. Aliaj nacioj plendas pri tio kaj insistas ke iliaj lingvoj ankaŭ fariĝu oficialaj ekz. en UN kaj EG. Anstataŭ komuna dua lingvo 270 milj preferas la rusan kaj 360 milj la anglan. Unuiĝinta lingva Eŭropo estas bedaŭrinde nur revo, sed estas urĝe bezonata enkonduki komunan duan lingvon kaj iam oni devas fari tion. Ekzistas diversaj alternativoj aŭ vivanta nacia lingvo, aŭ morta lingvo kiel latino, aŭ jam ekzistanta planlingvo kiel Esperanto aŭ tute nova artefarita lingvo. La fakto tamen

estas ke la plej disvastigata dua lingvo estas la angla sed kiam tiom multe da personoj parolas nacian lingvon kiel la dua ili ofte simpligas kaj malbone uzas ĝin. Tiam la lingvo riskas perdi sian identecon. Esperanto estas freŝa, vivanta kaj povus savi la anglan lingvon de misuzo. La angla kaj Esperanto povus funkcii kiel partneraj lingvoj.

**Dankon al d-ro Dazzini**

Dum la malfermo ludis infana orkestro sub gvidado de s-ino Iva Åberg kaj ĝi bele kontribuis al la soleneco.

Omaĝe al la forpasinta ĝenerala sekretario d-ro Mario Dazzini la prezidanto per varmaj vortoj memorigis pri lia altvalora kaj sindona laboro por ILEI. Rezentantoj por diversaj instancoj kaj partoprenantaj sekcioj salutis la konferencon. Por la komunumo Kungälv salutis la funkcia lerneja direktoro Anders Behn kaj por la popolaltlernejo la vicrektoro Birgitta Nesterud. S-ro Roland Lindblom salutis en la nomo de UEA. Vespere la komunumo akceptis la konferencanojn.

Dum la konferenco semajno sekvis prelegoj, grupa laboro, ekskursoj kaj distraj programejoj. Docento Ebbe Vilborg prelegis pri La sveda lingvo; s-ro Harold Brown, Londono, prezentis



ĝis en Augsburg aliĝis pli ol 800 personoj.

1987, la "Jubilea", okazos en Varsovio kaj estos pli "festivala" ol la kutimaj kongresoj.

1988, Esploroj nun okazas por trovi eblecojn okazigi la kongreson en la urbo de nia Centra Oficejo, Rotterdam.

1989. Por tiu jaro venis kelkaj invititoj. Inter alie pro oferto de Bri-

tujo ke ni ricevos senkostajn kongreslokalojn en Brajtono, la estraro akceptis tiun invitation.

1990. Jam en Vankuvero la Komitato esprimis principan deziron aranĝi kongreson en Afriko en tiu jaro. Kontaktoj kun Eburaj Bordo indikas bonajn eblecojn, sed ankoraŭ estas tro frue diri ion definitan.

**Roland Lindblom**



*La nova estraro de ILEI.*

*S-ro Bacev, Bulgario, Prof-ino Cabina Dazzini, Italujo, s-ro E. Symoens, Belgujo, S-ro B. Andreasson, Svedujo. Mankas la prez. prof. Szerdahelyi, Hungarujo. Fotis Lisbeth Andreasson.*

sian lernejan projekton por la unua fojo; s-ino Iva Åberg prelegis pri kaj prezentis Sveda infanliteraturo post 1945; s-ino Lisbet Andreasson prelegis pri Svedaj moroj kaj kutimoj; s-ro Lennart Åberg prezentis Aktivecojn inter infanoj per Esperanto kaj s-ro Bertil Andreasson prelegis pri La sveda lerneja sistemo. Prof. Humphrey Tonkin, Usono, prelegis pri La rolo de la instruado en la Esperanto movado. La du lastaj prelegoj aperos en Internacia Pedagogia Revuo.

#### **Nova estraro**

Unu tagon oni dediĉis al asembleo kiam oni i.a. elektis novan estraron por la venonta trijara periodo. La novelektita estraro estas la jena: prez. Prof. Istvan Szerdahelyi, Hungarujo; v.prez. S-ro Edward Symoens, Belgujo; ĝen.sekr. Prof.-ino Catina Dazzini, Italujo; v.sekr. S-ro Marin Bacev, Bulgario kaj kasisto S-ro Bertil Andreasson, Svedujo.

#### **Venontjare en Leuven?**

Oni ankaŭ decidis pri la venontjara konferenco. Tre kredeble ĝi okazos en Leuven, Belgujo la 12-an – 19-an de julio 1986. Ĉar la universala kongreso de UEA okazos en Pekino, la konferenco fariĝos pli ampleksa ol antaŭe por ke ĝi iomete anstataŭos la

UK-on en Eŭropo por tiuj, kiuj ne vojaĝos Ĉinion, do ne nur aranĝo por instruistoj sed por ĉiuj esperantistoj.

La grupa laboro okupis sin pri la ĉefa temo de la konferenco kaj la rezulto estas la jena rezolucio:

## **REZOLUCIO**

**La 19-a Konferenco de la Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj, okazinta de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1985 en Kungälv – Svedio, okupiĝis pri la temo "English yes – Esperanto jes. Lingvoj kiel partneroj."**

Traktante kaj pridiskutante la temon, la Konferenco rezume reko-

mendas kaj sugestas konsideri jenajn punktojn:

- Kommuna-Eŭropa--Lingvo estas urĝe bezonata, ĉar ĝi interligas la eŭropajn popolojn kaj kreas tian solidarecon, kiu estas bazo de komunaj agoj,
- la plurlingveco, t.e. lerni laŭeble plurajn lingvojn, signifas malŝparon de valora lernotempo kaj krome komplikigas solvojn de komunaj taskoj,
- por la eŭropaj popoloj restas nur du eblecoj: aŭ akcepti naciajn lingvojn, aŭ alternative ekzistantan funkciantan planlingvon,
- inter la naciaj lingvoj defakte la angla lingvo estas la plej uzata kaj plenumas diversspecajn vivnecesajn taskojn,
- tamen ĝi riskas perdi sian identecon.
- Esperanto kiel sola funkcianta kaj vaste uzata planlingvo kapablas partnere solvi la lingvan problemon en la mondo,
- la lernado de Esperanto komenciĝu kiel baza lingvo en la lernejoj kaj estu instruata en publikaj kursoj,
- kongresoj, konferencoj kaj internaciaj parlamentoj uzu la avantaĝojn de Esperanto,
- Esperanto de partnera lingvo evoluu iom post iom al sola Komuna-Dua-Lingvo.



*En la montrofenestroj de SE-banken estis dum la konferenca semajno aranĝita ekspozicio de s-ro Lennart Åberg. Fotis Lisbeth Andreasson.*

# La virinaj konferencoj en Nairobi

Dum tri semajnoj virinoj ludis gravan rolon en la kenja ĉefurbo. De Kenyatta International Conference Center al la universitato, inter la stratoj Uhuru Highway kaj Moi Avenue, areo ĉirkaŭirebla dum malpli ol unu horo, ili, 10-13 mil virinoj kaj kelkaj viroj, kontribuis al la vivo en jam antaŭe vivoplena urbo.

Anita Lindblom, kiu portoprenis la konferencojn ĉisube publikigas sian taglibron de tiuj semajnoj – tre interesa legado...

## Eltiroj el la taglibro 1985

### La 6-an de julio

Ek al Nairobi! Survoje kelkaj horoj en Londono sen pluvo.

### La 7-an de julio

Kiam mi vidis la ebenaĵon sterniĝi sub la aviadilo mi sentis papiliojn en la stomako. Mi estas en Afriko, malnova revo realiĝis.

### La 9-an de julio

Ĉie mi kunhavas flugfoliojn pri esperanto, kiuj mi unue korektas, ĉar estas skribararo, kaj poste disdonas al interesitoj. Registrigis min ĉe la Forumo.

### La 10-an de julio

La inaŭguro de la Forumo. Kiom da virinoj, kiom da koloroj, kiom da ĝojo! Unu de miaj fortaj memorbildoj estas la ĝojbrila Sveda Kristina lernante kanti en la svahila de tutnigra, granda nigriano.

### La 11-an de julio

Plurcenthomaj vicoj antaŭ la enirejo de la universitato pro la sekuriga kontrolo. Konatiĝis kun Prisca dum prezento pri sveda sindikata edukado. Serĉis japaninoj por trovi Yukiko Isobe el Tokyo, kiu survojis al la UK en Augsburg. Translokiĝis al Augusta, virino kun rava historio, kiun Kerstin renkontis en 1980 en Kopenhago. Ĉeestis prezentadon de la aktuala situacio por japanaj virinoj.

### La 12-an de julio

Aŭtobusveturo al hotelo Chirimo por labori per nia prezentado. Juna viro helpis nin halti la aŭto-

buson batante la plafonon. Post nur minuto fulmotondris kun torenta pluvo. Ni alvenis al la hotelo kun nur la bankostumoj en la sakoj ankoraŭ sekaj.

### La 13-an de julio

Butikumado kun Kerstin kaj poste vizito en la hejmo de Prisca. Renkontis kvin de la sep infanoj

kaj ŝia edzo, kiu volonte parolis pri Svedio pro sesmonata kurso ĉe KF antaŭ kelkaj jaroj. Interesaj diskutoj pri similaĵoj kaj malsimilaĵoj rilate vivkondiĉoj en Kenjo kaj Svedio.

### La 14-an de julio

Pluvis. Augusta, nun pensiulo, rakontis pri sia laboro inter malriĉaj homoj en la norda parto de Kenjo. Sur la aŭtobuso mi renkontis danino, kiu konas mian danan amikino Brita. Kiu diris ke la mondo estas granda? Post akcepto en la sveda ambasadorejo Kerstin kaj mi revenis al Augusta por renkonti ŝian filinon. Tiu ne venis pro la jusa morto de la patrino de ŝia plej bona amikino. Ni poste trovis ke tiu patrino estis amikino de sudafricana amiko de Kerstin en Stockholm. Kiu diris ke...?

### La 15-an de julio

Inaŭguro de la Konferenco. Multe pli strikta ol la Forumo inaŭguro, kun prezidento Moi kaj aliaj altrangaj partoprenantoj. Renkontis du ĉarmaj kuzinoj kiuj scivolis pri esperanto kaj ni havis agrablan kafaŭzon kune. Korektis flugfoliojn.

### La 16-an de julio

Trafolemis la kvar kilograma fasko da konferenca dokumentoj. Manĝis peco da ananaso ĉe la Forumo foiro, sekvis iom da malbonfarto. Iris vespere al akcepto kun multaj konferenculoj, sed restis nur horon.

### La 17-an de julio

Ekskurso al la savano en la nacia parko de Nairobi. Vidis multaj bestoj, i a ideto de hipopotamo. Tiaj malofte videblas, iris la gvidanto. Vespere al festeno en domo ekster la urbo. Pli ol cent gastinoj el tridek, ĉefe afrikaj, landoj. Kantoj kaj diskutoj.

### La 18-an de julio

La tago de nia (mia laborgrupo en la sveda UN-grupo) prezentado. 62 aŭskultantoj, 6 viroj, je la fi-



Augusta kaj Kerstin alvenis al festeno. Fotis Anita Lindblom.

no. Pasigis la resto de la tago ĉe la konferenco, kie oni diskutis la malfacilan punkton pri diskriminado.

#### La 19-an de julio

Intervjuis Dunja Pastizzi-Ferenĉié kaj ŝian edzon Ante, ĉarma paro. Eltrovis ke MasterCard ne valoras en Kenjo. Renkontis Veronica, unu de tiuj admirindaj, fortaj, vilaĝaj virinoj, kiuj kolorigas la Forumon. marŝo de la universitato al Kenyatta Centre estis malpermesata. Le fermo – emocia – multajn "Ĝis revido"-jn.

#### La 20-an de julio

Post problemetoj forveturo en luita Land Rover, kvin virinoj kun la celo Monduli, Tanzanio. Pli ol kvar horojn por trapasi la limon, kaj ni devis tranokti en Arusha. Ni miris, ĉar eĉ longe for de vilaĝoj ni vidis bele ornamitajn, migrantajn virinojn ĉe la vojo. Do, ne nur ornamaĵoj por la turistoj.

#### La 21-an de julio

Post horon por ripari la aŭton ni direktiĝis al la vilaĝo kie laboras Jan Setréus, sveda esperantisto. Jan bonvenigis nin per bongusta bananlunĉo. Al la foiro: kvin helhaŭtaj virinoj kun centoj da masajoj. Oni fikse rigardis nin kiam ni komercadis.

#### La 22-an de julio

Jan regalis per fragetoj kaj "långfil"! Renkontis lerneĵinojn de Jan kaj gajan grupon da infanoj. Ni fotis kaj fotis. Interesa estis vizito en masajvilaĝo en la montaro. Vespere granda araneo ĉe la lito. Brrr!

#### La 23-an de julio

Tri virinoj forveturis per la aŭto. Kerstin kaj mi restis, enamiĝintaj en Monduli, ĉesante ekskurson al Kilimajaro. Vagadis en la ĉirkaŭaĵoj.

#### La 24-an de julio

Rondiro en la vilaĝo. Ĉe la butikstrato estis ĉie malfermitaj pordoj. Klientoj elprenis "kangas" (vesto-ŝtofo) por rigardi la kolorjn, kaj iom da bruo signalis kie estas bierejoj. En la kafplantejo ni ŝtelis iom da fruktoj, rostis ilin en la forno kaj ĝuis la kafon past tri tagoj sen la dia trinkaĵo.

## Nova internacia organizo fondita – "Parlamentarinoj por paco"

"Ni estas en akordo. Nun la armigado devas esti haltigita". Tion deklaris antaŭ iom da tempo 31 parlamentarinoj el 15 landoj, kiuj kolektiĝis en Stockholmo la 11-12 aprilo. Estis virinoj, kiuj akceptis inviton de Ambasadoro Maj-Britt Theorin, la sveda reprezentanto en la Malarmigada Komisiono de UN en Genevo, veni al Stockholmo.

Ŝi invitis parlamentarinojn de la tuta mondo al konferenco en Stockholmo por prepari la diskutojn pri paco dum la virina konferenco de UN en Nairobi ĉisomere. La virinoj, kiuj akceptis la invitation estas prestiĝaj parlamentarinoj el ĉiuj kontinentoj.

La plaj konata estis Valentina Teresjkova, astronauto kaj membro de la centralkomitato de Sovetio. Estis tie ankaŭ i.a. Ann Hercus, ministro pri virinaj aferoj en Nov Zelando, Patricia Schröder el Usono, Margareta Alva el Hindujo, Sylvia Hernandez el

Meksikio kaj Phoebe Asiyo el Kenjo.

Phoebe Asiyo invitis al la virina konferenco en Nairobi

Phoebe Asiyo estis en Stockholmo kiel reprezentanto por la virinoj en la kenja parlamento, sed ankaŭ por inviti la politikistinojn al la granda virina konferenco en Nairobi en julio.

Ideo pri speciala organizo ekestis spontane – Maj-Britt Theorin unua prezidanto

La ideo pri speciala organizo por parlamentarinoj ne ekzistis kiam Maj-Britt Theorin invitis al la konferenco. Ŝi venis de unu el la usonaj virinoj dum la konferenco kaj la ceteraj entusiasme akceptis la ideon.

Unufoje poĵare oni kolektiĝos kaj la prezidanteco cirkulos inter la landoj ĉiujare. Dum la unua jaro Maj-Britt Theorin, Svedio, estos prezidanto.

Märtha Andreasson

## Libe ankaŭ kongresis en Augsburg

La 53a internacia kongreso de blindaj esperantistoj okazis la 27an de julio ĝis la 3a de aŭgusto, do tuj antaŭ UK. En Ringhotel Alpenhof, Augsburg, kolektiĝis 147 partoprenantoj, blinduloj kun gvidantoj, el 17 landoj.

Grava tasko por Ligo Internacia de Blindaj Esperantistoj, LIBE, estas eldonado en brajla skribo de speciale necesa literaturo. Dum la pasinta laborjaro ni sukcesis eldoni Plena Analiza Gra-

matiko, en brajlo 10 grandaj volumoj.

La kongresoj kompreneble estas bonaj okazoj por interŝanĝado de spertoj speciale utilaj por la grupo. En kongreso akceptis tri rezoluciojn el kiuj ni sube donas la trian kun plej ĝenerala intereso.

La internacia reprezentantaro de la blindaj esperantistoj



#### La 25-an de julio

Jan kunsendis salutojn al ĉiuj amikoj kaj ni forlasis lin. Neglektante la rekomendojn preni taksion de Arusha al Nairobi, ni faris la vojaĝon aŭtobuse. Neforgesebla tago kun spertoj de ordinara afrika vivo.

#### La 26-an de julio

Butikumado kaj lastatempa ĝuo de kunestado kun novaj geamikoj. Vespere la revojaĝo komenciĝis kaj la decido reveni firmiĝis.



## Bokauktion 3

Ännu en kartong böcker har done-rats till SEF, och vi erbjuder våra läsare förvärva dem.

Insänd ett brev till Esperanto Centro, Brunnsgatan 21, 111 38 Stockholm, senast inom två veckor efter tidningens distribution och meddela vilka nummer du önskar, och vad du vill betala för varje bok. Skriv "Bokauktion" på ku-vertet! Sen sänder vi per post-förskott.

Av böcker i auktion 2 blev inte alla sålda. Ta fram La Espero nr 8/1984 och titta efter om du kan vara intresserad av någon bok i listan på sid 115 och ge ett bud. Det går bra i samma brev.

Ett tips: Många bibliotek har obetydligt med esperantoböcker eller saknar helt. Offra några tior och skänk dem några från vår auktion! Du slår två flugor i en smäll: Stöder SEF ekonomiskt och sprider kunskap om esperanto.

### INBUNDNA

- 52 La Nobla korano, 2-a eldono 1970, tre bona stato
- 53 R. Schwartz: Kiel akvo de l'rivero, 1962, 486 p.
- 54 F. Bernadotte: La Fino, 1945, 139 p.
- 55 G. de Maupassant: La normandaj rakontoj, 1953, 210 p.
- 56 I. Silone: Fontamara, 1930, 188 p.
- 57 E. Olsson: Kredo, floroj kaj dinamito, 1961, 79 p.
- 58 F. Levstik: Martin Krpan (infanlibro), 1954, 60 p.
- 59 M. Boulton: Zamenhof, aŭtoro de esperanto, 1962, 264 p.
- 60 D. Flood: Mi serĉis oron kaj oleon, 1946, 132 p. malbona stato.
- 61 S. Engholm: Vivo vokas, 1946, 179 p.
- 62 La nova testamento (poŝlibro), 1947, 358 p.
- 63 L.L. Zamenhof: Lingvaj respondoj, 1962, 124 p.
- 64 J. Lewesdon: Jen Londono (gvidlibro por turistoj), 1971, 50 p.
- 65 F. Szilagy: La granda aventuro, 1945, 143 p.
- 66 W. Kloepffler: Vagabondo kaj sinjorino, 1931, 204 p.

### HÄFTADE

- 67 P. Kropotkin: Etiko I, 1924, 235 p.
- 68 F.C. Xavier: Antaŭ du mil jaroj..., 1951, 400 p.
- 69 Adi: La forto de l'vero, 1968, 59 p.
- 70 Rakontu, samideano (diversaj aŭtoroj), 1967, 70 p.
- 71 J. Baghy: La verda koro, 1947, 74 p.
- 72 Evangelia kantaro, 1952, 76 p.
- 73 F. Szilagy: Kokokrias jam, 1976, 197 p.
- 74 J.F. Berger: Niko kaj Nina, 70 p.
- 75 L. Wegener: La arto fariĝi centjara, 1953, 59 p.
- 76 G. Furhammar: La homo kiun milionoj aŭskultas, 1941, 112 p.
- 77 S. Engholm: Al Torento, 1934, 93 p.
- 78 K. Aszlanyi: Sep vangofrapoj, 1943, 148 p.
- 79 K. Capek: Libro de apokrifoj, 1970, 105 p.
- 80 Mondamapo, redaktis: Tibor Sekelj, 1968

.....  
substrekante ke la kulturaj valo-  
roj devas esti alireblaj por ĉiuj ho-  
moj.

admonas la respondecajn in-  
stancojn zorgi ke tiuj valoroj estu  
je dispono ankaŭ de handikapu-  
loj. Koncerne blindulojn tio i.a.  
signifas ke oni eduku ilin al  
kompreno de la plastikaj kaj figu-  
raj artoj per diversaj rimedoj,  
ekz. permesante al ili permane  
palpo artaĵojn, muzeajn objek-  
tojn ktp, kiuj ne difektiĝus pro tu-  
ŝado.

Birger Viggen

## Dags att prenumerera!

Nya priser för 1986

El Popola Ĉinio 1 år	90:--
2 år	150:--
3 år	210:--
Monato	160:--
Monato inklusive La Jaro	180:--
Heroldo de Esperanto	90:--
Kancerkliniko	80:--
Literatura Foiro	80:--
Planlingvistiko	50:--
Literatura Foiro kaj Planlingvistiko	125:--
Omoto	45:--
Ovo	91:--
Fonto	125:--

Hur gör man?

Sätt in rätt belopp på postgiro 2012-3 och skriv tydligt på talongen vad summan är avsedd för.

## Bokrecensioner

Esperantolitteraturen, både i original och översättningar, bara växer. Ulla Luin fortsätter här att recensera några nya böcker. Ni vet att ni kan köpa böckerna genom Esperanto-förlaget – tänk redan nu på jullektyren!

**Diskriminering, Diskriminacio**, är ett aktuellt ämne, som också var tema för esperantokongressen i Stockholm för några år sedan. De viktigaste bidragen till den kongressen har nu kommit ut i bokform, tryckt i Belgien.

